

PENSEO

N-ro 324

okt. / 2018

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 29-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Paulo Silas (Brazilo)



Spektaklo

Mi estis konscia kiam mi vidis min fali.
En la mallumo mi vidis min fali.
Mi spektis mian falon kaj spertis la falsenton.
Mi falis konscia, ke mi spektis min fali.
Mi falis kaj spertis la senton min spekti.
Kiam mi atingis la grundon,
mi spektis min sperti la kreviĝdoloron.
Mi decidis tiam fali duafoje, sen spektantoj.

la 1-an de aprilo, 2016

Fina Juĝo

De la Andoj, ekiras.
Ĝi survojas al la atlantika maro.
Kunaj, de supre kaj malsupre, venas pliaj
atestantoj.
Peze, putre, fetore fluas la abomena pasto.
La ruĝo de la sango iĝis nigrebluaj nuancoj.
Piedoj, hartufoj, kapoj.
Fiŝoj voras homhistojn.
Fiŝoj monstriĝas sub la densa, grasa likvo.
Intestoj flosas sursurface,
kvazaŭ vivantaj serpentoj, serĉe de predo.
Orfaj brakoj,
per duraj fingroj kiuj impetas al ĉielobluo,
verdiktas sen apelacirajto
kontraŭ ĉiuj iam ekzistintaj dioj.
Ilia neglekto restos eterne registrita,
neforviŝeble gravurita
sur la surfaco de la Amazono kaj ties
alfluantoj.

Ĉiuj fontoj, akvoj sub ĉiuj pontoj,
lagoj, sukaj valoj,
riverkomencoj, putoj, maroj kaj oceanoj
ne sufiĉos por likvidi la transgeneracian
ŝuldon.

Dolĉaj kaj salaj likvoj netrinkeblas.

Ago nia vanas nun.

Agonias ni sen trinkon vidi,

kun sekaj gorgĝoj.

La pasto solidiĝas en niaj buŝoj kaj sufokas.

Neniun indulgon. Neniun pardonon.

Nenion krom tujan pagon.

la 23-an de aprilo, 2016

el Transgeneraciaj kulpoj

Veĵdo (Ĉinujo)



Brilo de kometo

funebre pri Paulo Silas

Vi, kometo tranĉas tra l' mallumo
inter steloj jen sur la ĉielo,
kun gracio kaj kolora belo,
jam flugante per vivokonsumo.

Via bril' volviĝas per kostumo
kun glimanta franĝo de flavhelo,
pentras belan arkon per riveloj
kiu parolas sub la luno.

Sed ekbrilo via efemeris,
kvankam ore bunta kaj impona.
Via flug' de supro ja liberis,

ve! malfeliĉe la senfanfarona
tranĉo tra la volbo dum momento

estas nur mallonga sinprezento.

**Laŭ la nekrologo en n-ro 31 de Belarta Almanako, Paulo Silas (1990-2017), juna brazila poeto forprenis de si la vivon je la 24-a de oktobro, 2017.*

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Vintro

La doloro frostigis
mian septembron
iam tiel rozkoloran...

Senkoloraj tagoj lamentas,
kaj fluas tra l' fenestro,
kiu min rigardi permesas
la nun malproksiman placon,
kiel nigra-blankan filmon.

Sed l' anĝelo de l' espero,
el la paĝoj de l' Evangelio,
responde al larmoj kaj preĝoj,
indulgema kantis al oreloj niaj:
"Ĝojegu, karulino!"
Ne malfruos printempo!



Juiz de Fora, 12/09/2018.

Estu lumo!

Heredantoj de l' Lumo,
jen ni feliĉaj, tamen,
dancantaj en la mallumo
de nia malsaĝeco.

Ni avidas je l' ombro
vanta de l' aplaŭdoj
nutranta la famon,

kiu nin trompas,
kaj forpasas.

Lumiĝi bezonas
la senmova animo,
dum estas tempo:
ĉar nur la lumo
ne korupteblas!

Juiz de Fora, 20/09/2018.

Tiberio Madonna (Italujo)



AŬTUNO

La tapiŝo bruetanta
de l' aŭtuno
formita de la falintaj folioj
steloformaj malpezaj
el karton' flava kaj bruna
anhelas, murmuras
susuras
flustras ion
sub la paŝoj melankoliaj
de miaj lantaj piedoj.
Kaj la friska vento
de temp' al tempo
levas la foliojn
kiuj dancas, saltas
turniĝas
kaj sekvas min.
La blovoj malvarmetaj
sonantaj
kantas tristan muzikon
kaj ludas la kordojn
de mia melankolio
kiu vekiĝis karesata
de la frua eknoktiĝo
kaj nombras la stelojn
ĵus aperintajn.
La steloj subaj
komencas malheliĝi
dum la steloj superaj
provas relumigi

la koron
 por la proksima nokto
 kaj revarmigi ĝin
 per siaj punktaj fajretoj.
 Estas nia tasko
 kapabli ilin sonĝi.

Dimitrije Janičić (Serbujo)



DISIĜO

Foriru!
 Mi estos en ordo,
 mi ploras malgrande kaj trankvile,
 nur hodiaŭ, eble hieraŭ,
 ĉi tiu semajno,
 kaj rompos.
 Ne zorgu!
 Foriru!
 Tio ne estas terura,
 mi premos koron,
 mi travivos.
 Foriru!
 Ne zorgu!
 Mi viŝos malesperon de frunto
 denove ekpensos konsolon.
 Foriru!
 Vi estingis mian Sunon,
 tamen vi ne zorgu
 neĝo kaŝos viajn piedsignojn
 ĉio nomiĝos hieraŭ.
 Foriru, al diablo!
 Ne lezu krustojn de miaj vundoj,
 simple foriru
 sen adiaŭo, sen saluto,
 ekpensu ke mi estis malliberejo
 fola konvulsio,
 malsana sonĝo,
 la eraro de elekto,
 nur apudvoja stacio.
 Foriru, al diablo!
 Mi trovos buldozon de sufero
 mi ebenigos

detruaĵojn de la amo.

Vi perdigu!



Vejdo (Ĉinujo)

La luno en aŭtunmeza nokto

Ĝi sin kaŝas en nuberoj honte,
 sur ĉielo regas griza brumo.
 Vent' ekblovas fole jen demonte.

Arboj nestas en la nokt-mallumo,
 svingas siajn branĉojn kun susuro,
 ŝajne malkontentaj pri l' brakumo

nigra subpremata de malplezuro.
 Ĉio ne videblas nur kun krioj
 de insektoj tute en obskuro.

Post moment' elvenas la radioj
 de la luno el post nubamaso
 kvazaŭ imagitaj fantazioj.

Grizaj nuboj flosas en forpaso,
 cedas lokon al kreskanta luno,
 kiu elas fine el nub-naso.

Jen plenlun' aperas de aŭtuno,
 kun helpala vang' kaj flava brilo.
 Tuta ter' ekklaras tuj en nuno.

Montoj staras belaj en profilo;
 lago pace glimas en kvieto;
 la insektoj ĉirpas per bel-trilo.

La plenlun' avare per lumĵeto
 farbas ĉion sur la ter' varie

de malhel' al helo, eĉ ĝis kreto.

Ha, pejzaĝo sub lunlum' magie
sin prezentas al la lunĝuantoj.
Kiel bele, rave, harmonie!

Tio estas por okulaj frandoj.



Mori (Usono)



AFORISME (35)

Politiko
estas arto
de paco
kun malamiko.

Idiotoj batalas
per bomboj,
saĝuloj kunvivas
kiel kolomboj.

Pro subpremo de
kruelaj despotoj
respondecas ankaŭ
subpremataj idiotoj.

Heroo estas ne tiu,
kies pafoj trafas
sed homo pacoplena
kiu neniam pafas.

Malbonaj
politikisto kaj generalo
estas tiuj, kiuj
kredas je batalo.

En la mondo
la plej bona loko
estas tie, kie

regas paca politiko.

Kie la plejmulto estas
saĝaj patriotoj
ne estas taŭga lando
por regno de despotoj.

Homo nur tiam povas
esti vere feliĉa
kiam la ceteraj homoj
estas feliĉa kaj riĉa.

Esti riĉa feliĉulo
inter mizeraj uloj
ne estas la kutimo
de bonkoraj liberuloj.

Kie regas leĝoj
de sovaĝa ĝangalo
homo estas en daŭra
konkuro kaj batalo.

Homo en la senleĝa
kaj maljusta socio
kondukas plej sovaĝe
samkiel skorpio.

Homo kun granda
potenco kaj povo
ofte kondukas kiel
la plej stulta bovo.

La mondon konstruas
saĝuloj kaj patriotoj
kaj tion detruas
idiotoj kaj despotojn

Homo sen amiko
kaj kamarado
similas al ĉaro
kun rompita rado.

Kie ajn troviĝas
naivaj personoj
tie ankaŭ svarmas
homfiguraj hienoj.

Grandanima homo
sur alta posteno
estas despli modesta
persono.

Tie kie mankas
libero
kvazaŭ mankas
aero.

Birdo por flugi
bezonas aeron
homo por flugi
bezonas liberon.

Homo, kiu servas despotojn
pro mono
aŭ posteno
estas la Plej malbona
persono.

Servantoj de tiranoj
kaj despotoj
konsistas el kanajloj
kaj idiotoj.

Nacio kiu vivas pace

kiel kolomboj
gajnas pli ol nacio,
kiu vivas minace
per bomboj.

Leĝoj de naturo
pli potencas ol tiuj
de l' kulturo.

Skorpio
pli bonas ol homo
kiu murdas
nome de Dio.

Unueco de Dio
kaj ĉio
estas la ununura

relegio.

Amo
estas la ununura
religio

ĉio alia estas
nenio.

La diferenco
Inter kruela homo
kaj hieno
estas nur homa
mieno.

Bonulo estas tiu
kies okuloj
vidas nur bonan

en aliaj uloj.

La plej granda Nulo
estas ĵaluza ulo.

Kaj orgojla
kaj flatema homoj
ambaŭ fiodoras
kiel putraj terpomoj.

Homo estas ne tiu
kun du piedoj
du oreloj
kaj du okuloj,
sed tiu, kiu zorgas
pri la suferoj
de aliaj uloj.

Papos Nascentes (Beazilo)



Fipolitiko

mia konsolo la politikisto mallibera
el tribunal' la plej supera juĝisto arestas
alia, fuŝamike, lin liberas
alia politikisto konfesas fikuraĝa:
“iun murdota mi elektas.”
(ripetaj telefonalvokoj al la liberiganta juĝisto)
la socion mi trompas:
revenu li al la posteno en la senato frida.

sed la senato varma
kion la câmbro decidas — konfirmas
tro da negocaĉoj ho! ĉiuj bonkoruloj
la gazetaro aro de misfaro
divenas tuj:
— la prezidento daŭros!
Flamo vera
Flamo Mi Estas
cetero nur iluzia limo
cerba fikcio

malekzistas limo landlimo
por flugo naĝo en cerboj
birdaj fiŝaj

senlime plia efiko
kora komuniko
interlingvas

homflugo naĝo ĉu dependas de aĝo?
onin liberas homa fantazio:
enkore jen realo de Poezio.

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



Blankajflugdrakoj.
Bluokula fraŭlino.
Lepor' ekkuris.

✻

Ŝtormas l' aŭtuno.
Sukcenaj vinberaroj.
Fruktodona ter'.

✻

La prujno kisis
krizantemojn en ĝarden'.

Amara amo.

✱

Glaskoj malplenaj.

La vortoj jam diritaj.

Prujno sur glasoj.

el *Araneaĵoj*

Sarah Kirsch



Ĉi tiu vespero, Bettina

Ĉi tiu vespero, Bettina,
ŝanĝiĝis nenio. Ĉiam
ni estas solaj, se ni skribas al la reĝoj,
al tiuj de l' koro, kaj al tiuj
de l' ŝtato. Kaj ankoraŭ nun
ektimas nia koro,
se aŭdeblas aliaflanke de l' domo veturilo.



tradukis **Dorothea Kaiser (Germanio)**

Hans Magnus Enzensberger



pri la malfacilaĵoj
de la novedukado

Efektive brilaj estas
ĉiuj ĉi grandaj planoj:
la Ora Epoko,
la Regno de Dio surtere,
la formortado de la ŝtato.
Tute evidente.

Se nur la homoj ne estus tiaj!
Ĉiam kaj ĉie tiuj homoj ĝenas.
Ĉion ili konfuzigas.

Kiam temas pri la liberigo de la homaro,
ili kuras al frizisto.
Anstataŭ entuziasme posttroti l' avangardon
ili diras: nun biero estus agrabla.
Anstataŭ batali por la justa afero
ili luktas kun varikoj kaj morbilo.
En la decida momento
ili serĉas leterkeston aŭ liton.
Kiam estas komenciĝanta nova jarmilo,
ili kuiras vindotukojn.

Pro tiaj homoj, simple dirite, fiaskiĝas ĉio.
Kun ili oni ne povas atingi ion en la ŝtato.
Sako da puloj pli bone kunteneblus.

Etburĝa ŝanceliĝado!
Konsumidiotoj!
Postrestintoj el la pasinteco!

Oni ja ne ĉiujn povas mortigi!
Oni ja ne la tutan tagon povas superŝuti ilin
per
paroladoj!

Jes ja, se la homoj ne estus tiaj,
jen la bona afero progresus rapide!
Jes ja, se la homoj ne estus tiaj,
tiukaze ni...!

(En tiu kazo ankaŭ mi ne plu volus ĝeni ĉi tie.)



tradukis



**Hans-Georg Kaiser
(Germanio)**

El Ĉina Antikva Poezio

Li Bai (701 - 762)



Anto pri belulino

En rob' de roza nub' kaj kun trajto peonia,
Rosite vi pli ĉarmas en brizo eŭforia.
Nur en mirlando povus vi esti renkontita,
Aŭ, sub la lun', vidita en mond' de fe' vizia.

Zheng Hui (? - ?)



Skribo sur la muro de la gastejo

Rubusoj, en aroma songo,
Pro primavera frido tremas;
Kaŝetas pordojn helverdaĵo,
Hirundoj pace ripozemas.

Dum ruĝa kandellumo mortas,
Harpinglon jadan ŝi angore
Batrompis, kaj kalkulas: devus
Atingi l' urbon li ĉi-hore.

Du Fu (712 - 770)



VERSKVARO

Sur branĉoj verdsalikaj du oriojoj ĥoras,
Linio da ardeoj al blu' ĉiela soras.
Vidiĝas tra fenestro miljara neĝ' sur monto,
Ĉe l' pord' ankriĝas ĵonkoj de l' regno kiu foras.



Su Shi (1037 - 1101)



Spektakulo

Zefir' el oriento karesas en lumhelo,
La luno klostron vestas per aroma mantelo.
Mi timas nur, ke l' floroj fordormus
mezenokte,
Bruligas mi kandelon por ili en ruĝ-belo.

Du Mu (803 - 852)



Klaro kaj Brilo

Dum Klar' kaj Bril'* senĉese pluvetas kun fervor'

Survoje vojaĝantoj morozas de angor'.
Mi ĉuas: "Bovisteto, kie drinkejo estas?"
Li montras foren al la vilaĝ' Abrikotflor'.

**Klaro kaj Brilo: unu el la 24 sunperiodoj, kiu komenciĝas je la 4-, 5-a aŭ 6-a de aprilo, kaj dum kiu (precipe en la Festo de Mortintoj) oni vizitas la tombojn de mortintoj por ilin rememori.*

La printempo sude de la rivero Janzio

En vastego ruĝa-verda trilas birdoj,
En vilaĝoj kaj urbetoj flirtas vinvend-ŝildoj.
Ho, el kvarcent okdek temploj tra la regno,
Kiom vualiĝas svage en nebulaj bildoj?

Wang Yuchen (954 - 1001)



En Festo de Mortintoj

Dum Festo de Mortintoj enue vivis mi,
Kiel enmonta bonzo, sen floroj, sen ebri'.

Hieraŭ de najbaro mi petis lampofajron,
Kaj legis ĉe fenestr' ĝis aŭrora ekradi'.

Zhang Yan (? - ?)

Festo de oferado al ter-dio

Ĉe l' monto Erhu kreskas grenplantoj en
prosper',
Fermitaj domoj mutas kun porkostal', kokej'.
Kiam finiĝas festa festen' ĉe sunsubiro,
Ebriaj homoj hejmen reiras en vesper'.

Gao Chan (? - ?)

Al vicministro Gao Pian

Ĉielajn verdpersikojn vartas favora roso,
Ruĝabrikotojn portas sunplena la nubozo.
Hibisko ĉe l' rivero aŭtuna ja senflora
Ne plendas pri malfrua disflora graci-pozo.

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKKVINA

Hardado de la spirito

§15-01

La spiritohardado, la afektado, la apartiĝo disde la mondo, la ekstravaganceco, la ŝvelparoloj, la plendoj kaj la kalumnioj — ĉiuj ĉi tiuj estas nur la signoj de la aroganteco. Ili estas favorataj de la ermitoj en la valoj, mizantropoj kaj tiuj, kiuj preferus sin brulmortigi aŭ dronigi, por konservi sian purecon kaj honestecon.

Seng Zhinan (? - ?)



Verskvaro

Al ombra arbego por ligo l' boaton mi tiras,
Eosten de l' ponto pere de baston' mi
tren-iras.
La vesto subtile humidas en pluvo printempa,
Al mia vizaĝo, ho, tiu karese zefiras.
Elĉinigis



Minosun (Ĉinujo)



^^

La humaneco, la justeco, la lojaleco, la fido, la modesteco, la ŝparemo, la respekto kaj la ĝentileco — ĉiuj ĉi tiuj estas nur manieroj kaj rimedoj por sinkulturado, favorataj de tiuj, kiuj volas esti regantoj, regnificistoj, instruistoj, vagantaj kleruloj ktp.

La grandaj meritoj, la bonaj reputacioj, la adekvataj etiketoj inter la reĝo kaj liaj ministroj, la deca ordo de la superuloj kaj la subuloj — ĉiuj ĉi tiuj nur montras zorgojn pri pli bona regado.

La izolita vivo en la sovaĝejo, la retiriĝo al la kampoj, la senzorga hokfiŝa vivo — ĉiuj ĉi tiuj estas nur la manifestiĝoj de la senagado. Ili estas favorataj de vagantoj, eskapistoj kaj senzorgeco-serĉantoj.

La en- kaj elspirado, la eligo de la malfreŝa aero kaj la enigo de la freŝa, la grimado sur la arboj kiel urso kaj sinetendo kiel birdo — ĉiuj ĉi tiuj estas nur korpaj ekzercoj por longviveco. Ili estas favorataj de tiuj, kiuj faras korpan ekzercadon, dezirante gardi sian sanon kaj aspirante al la longviveco tia, kian Peng Zu ĝuis.

Iuj homoj kondutas sublime sen spiritohardado, sin kulturis sen alkroĉiĝo al la humaneco kaj la justeco, bone regas sen akiro de grandaj meritoj aŭ bonaj reputacioj, vivas senzorge sen vagado en la

sovaĝejo kaj ĝuas la longvivecon sen farado de korpaj ekzercoj. Ili forĝesis ĉion sed posedas ĉion; ili montras plenan indiferentecon sed akiras al si la plej bonan famon. Tiaj homoj enkorpigas la Taŭon, kiu trapenetas la ĉielon kaj la teron.

Tial oni diras: “La indiferenteco, la izoliteco, la malpleneco kaj la senagado — ĉiuj ĉi tiuj konsistigas la ekvilibrigilon de la ĉielo kaj la tero kaj la substancon de la Taŭo kaj la virto.”

Tial oni diras ankaŭ: “La saĝulo trovas malstreĉiĝon en si mem. Kiam li malstreĉiĝas, li estas trankvila; kiam li estas trankvila, li estas indiferenta; kiam li estas trankvila kaj indiferenta, li estas libera de ĉiaj zorgoj kaj imuna de ĉiaj malbonaj influoj. Sekve lia virto estas senmakula kaj lia spirito estas en integreco.”

§15-02

Tial, estas dirite: “La saĝulo sekvas la naturon dum sia vivo kaj ŝanĝiĝas kun ĉiuj estaĵoj en la mondo post sia morto. Li dividas la virton kun la jino tiam, kiam li estas en kvieteco, kaj dividas la movon kun jango tiam, kiam li estas en aktiveco. Li kreas nek feliĉon, nek malfeliĉon. Li respondas al la stimulo, reagas al la premo, kaj ekagas nur tiam, kiam li estas devigita. Ĉar li forĵetas la inteligentecon kaj la artifikecon kaj sekvas la naturan evoluon de la estaĵoj, li suferas nenian naturan katastrofon, nek implikiĝas en la mondecaj aferoj, nek elmetas sin al riproĉoj de la popoloj, nek al kondamnoj de la fantomoj. Lia vivo ŝajnas flosado; lia morto ŝajnas ripozo. Li faras nek meditadon, nek antaŭpensadon. Li brilas, sed ne blindigas. Li tenas sian vorton, sed donas nenian promeson. Li ne sonĝas dum li dormas; li ne maltrankvilas dum li estas vekiginta. Lia menso estas pura kaj simpla; lia spirito estas firma kaj senlaca. Simpla kaj indiferenta, li konformiĝas al la virto de la ĉielo.”

Tial, estas dirite ankaŭ: “La ĉagreno kaj la plezuro estas devioj disde la virto; la ĝojo kaj la kolero estas atencoj al la Taŭo; la ŝato kaj malŝato estas ofendoj al la vera naturo. Sekve esti libera de maltrankvilo kaj ĝojo estas la perfekteco de la virto;

esti sinkoncentrema kaj konstanta estas la perfekteco de la kvieteco; esti izolita for de la mondecaj aferoj estas la perfekteco de la indiferenteco; esti kontraŭa al nenio estas la perfekteco de la pureco.”

Tial estas dirite ankaŭ: “Se la korpo trolaboras sen ripozo, ĝi eluziĝas; se la spirito trolaboras sen ĉeso, ĝi laciĝas, kaj la laciĝo kondukas al forkonsumiteco. La naturo de la akvo estas: kiam ĝi ne estas malpurigita, ĝi estas klara; kiam ĝi ne estas malkvietigita, ĝia supraĵo estas ebena. La akvo ne povas esti klara, se ĝi estas blokita kaj sekve stagnas. Tio estas natura fenomeno.”

Tial estas dirite ankaŭ: “La pureco sen fremda substanco, la konstanta kvieteco sen ŝanĝiĝo, la indiferenteco sen agado, kaj la movo konforme al la naturo — tiuj ĉi estas la sencoj de la arto nutri la spiriton.”

La spadoj faritaj en la regnoj Wu kaj Yue estas konservataj en siaj ingoj kaj malofte uzataj, ĉar ili estas la plej valoregaj. Sed la homa spirito iras en ĉiuj direktoj kaj fluas ĉien. Ĝi atingas supren al la ĉielo kaj etendiĝas malsupren sur la tutan teron, transformante kaj nutrante ĉion en la mondo sen ke oni povus imagi al si ĝian formon. Ĝia nomo estas “Identigo kun la Sinjoro de la Ĉielo”. La Taŭo en siaj pureco kaj simpleco estas atingebla per la alkrōiĝo al la spirito. Se vi alkrōiĝas al la spirito, tiam ŝajnas, ke via korpo jam transformiĝis en spiriton kaj jam fariĝis unu tuto kun ĝi. Tiu, kies korpo kaj spirito fariĝis unu tuto, konformiĝas al la natura ordo.

Proverbo diras: “La ordinara homo ŝatas riĉecon; la severmorala klerulo preferas famon; la virtulo strebas al sia idealo; la saĝulo alkrōiĝas al la spirito.”

Tial la pureco signifas “esti sen fremda substanco”; la simpleco signifas “esti sen difekto al la spirito”. Tiu, kiu posedas en si la purecon kaj la simplecon, estas nomata “vera homo”.

Elĉinigiŝ




Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbujo)



Sentitole

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Noktiĝas.

Vibras stratolamp’

ĵetante ombrojn longajn.

Laŭ poeta vortokamp’

Hele lumas lamp’.

Lampiroj,

la strataj iloj

viciĝas. Brilas forte.

Ĉirkaŭ ili skaraboj.

Flitras en cirkloj.

Fenestroj

kvazaŭ steletoj

Dum nokto malheliĝas.

Malpleniĝas stratetoj

sen kandeletoj.

Paca nokt’.

Nek bojas hundoj.

Regas mira silento.

Nur vekiĝas amantoj.

pro koro flamoj.

Paliĝas

Luno vaganta.

Aŭdiĝas matena kok’

forte kokerikanta.

Vin salutanta .



Sekeco

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Sufokas

veter’. Malbona

por la homoj kadukaj.

Aŭdiĝas gril’ laŭtsona..

Ĝuo sindona.

Ondiĝas

herbej’. Matena

roso bonvena estus.

Foras freŝa nokt’ jena.

Peze eltena!

Fontanoj

ŝpruce allogas.

Birdetoj alflugantaj

soife sin apogas.

Ĉarmloge trinkas.

Sekiĝis

tero. Ŝtormeton

atendas homoj urĝe.

Aŭ akvo-tubo-reton.

Ŝpruci tereton.

Nokta pluv’.

savanta afer’.

Ĉiuj diras feliĉe

“Bonvenas pluvo sur ter’.

Beata ĉi ver’.”

Ŝanĝo de klimato

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Somero

pasis rapide.

Ĉi-jare floris stranga

klimato floro. Vide

nek plaĉa fide.

Maro de

mizeroj. Ĝemoj

pro peza misfortuno.

Nun, je ĉiuj mondflankoj.
Tro da obstakloj.

Depost pluv'
inundoj restas.
Kaloj sur vojoj ,domoj.
Bestokadavroj korkas,
koron traboras.

Lametas
vilaĝanoj tre
kaptitaj kiel musoj
fuĝas.Hunda viv' ofte
iĝas fatale.

Rikolto
nenia.Pezaj
zorgoj prenas la bruston.
Homoj dronos en ŝuldoj
ĝiskole.Povraj.



Aŭtunas

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Septembro
alvenis sune.
Komenciĝis migradoj.
Bridoj flugantaj kune
trans maren Lune.

Lernantoj
deziras puŝi
ĉielarkon pro feliĉ'.
Ne plu sur plaĝo kuŝi

sed scion tuŝi.

Laŭ strato
kuras ĉi vento
flavfoliojn.Morta danc'.
Pli kaj pli fortas vento.
Malgaja sento!

Oriĝas
aŭtuna suno,
kaj maizo sur kampoj.
Rikoltadoj ĝis Luno
aper'. El tuno

da dolĉaj
fruktoj gajnas vi
tunojn da suktoj. Benu
la naturon, mildan, ni.
Dank' al kara Di'.



Yanke (Ĉinujo)

Aŭtuno alvenas

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Cikadoj
mutaj sensone
adiaŭis por serĉi
varmegon laŭbezone,
kanti sent-drone.

Kvakado
de ranoj ĉesas
en frida akv' en kampo.
Ilin ventvip' agresas,
sed ne kareasas.

Okaze

ĉirpadas griloj,
svingante laflugilojn,
energie per triloj
sub lunaj briloj.

Kampmusoj
dormas en kviet'
en nesto el pajleroj
post maizgrajna diet'
kaŝita en pret'.

Knabpaŝtist'
preterpasas jen
laŭ kampvojo kaj bovoj
ronĝas herbojn per buŝplen'
ĉe la suna sven'.

La vento
blove sendas for
sovaĝanserojn norden,
krie kun gaka sonor'
de impona ĥor'.

Mi diris
jam al la somer'
adiaŭ kun ŝtormpluvo,
tajfun' kaj brula veter'
super seka ter'.

Renkontas
mi ja denove
aŭtunon orkoloran,
generan fruktipove,
ravan multmove.



*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforna
poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo

xa,xa,a (x=senrima).

SERENAJ MATENOJ

Esperanta eldonejo “Libera” eldonis la novan romanon de Julian Modest “Serenaj matenoj”.

En suna aprila tago en mara urbo subite malaperas Klara, bela, talenta knabino, lernantino en la lasta gimnazia klaso. Ĉu oni forkaptis ŝin por ĉantaĝi ŝiajn gepatrojn pri mono, ĉu por prostitui ŝin eksterlande aŭ iu murdis ŝin? Al tiuj ĉi demandoj devas respondi la polica komisaro Kalojan Safirov. La romano, kies stilo kaj lingvaĵo estas klaraj, taŭgas por esperantistoj komencantoj.

Oni povas mendi la romanon de:
Eldonejo “Libera” Lode Van Velde:
lodchjo@yahoo.com



Eldonas Redakcio de **Penseo**
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto,
Chongqing, 400023, Ĉinio
Tel: (023) 67095890 (hejme)
Retadreso: vejdo@163.com
Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.
Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin
turnu al www.elperno.cn/penlisto.htm

